

Eŭropa Bulteno

Februaro 2015, Numero 146

RAPORTO PRI LA AGADO DE EEU EN 2014



Ekstera Agado

La Platformo por multlingveco pluaktivis en 2014 kaj en ĝi nun estas krom EEU ankaŭ E@I kaj la studenta organizaĵo AEGEE, kies nuna reprezentanto estas ankaŭ esperantisto kaj tiel praktike esperantistoj havas 5 membrojn en ĝi. Okazis en 2014 unu kunsido de la Platformo en Bruselo la 14-an de marto kun aktiva partopreno de Seán Ó Riain, Jozefo Reinart, Maja Tišljár kaj Petro Balaž.

Dum 2014 (ĝis 30-a de novembro) EEU funkciis kiel kunordiganta kaj ĉefrespondeca partnero rilate la aprobitan eŭropan projekton lingvo.info kun 8 aliaj eŭropaj partneroj kaj kompleta budĝeto dum la jaroj 2013 kaj 2014 de 530.000 euroj. Tiusece okazis 3 kunsidoj: en Kaŭnas (Litovio) de la 5a – 8a de marto), en Zagrebo (Kroatio) de la 24a – 27a de junio) kaj Odense, Danlando, (de la 2a – 5a de novembro). La realigon kunordigis Maja Tišljár kaj en unuopaj taskoj kunlaboris ankaŭ ĉiuj estraranoj. La projekto finiĝis en novembro 2014 ĝis kiam devis esti plenumitaj ĉiuj planitaj laboroj por starigi tre grandan portalon pri lingvoj. La portalo ekfunkciis parte jam en septembro kaj konsistas el 4 grandaj partoj (Lingvopedia, Babilon, Lingvopolis kaj GeoLingvo). La tuta enhavo de ĉiuj 4 ĉapitroj konsistas el ĉirkaŭ 150-paĝa tekstaro kaj multaj bildoj kaj grafikonoj kaj sondosieroj. Ĉio estis tradukita al 21 lingvoj kaj nun la portalo estas uzebla en 21 lingvoj, ĉefe eŭropaj. Ĝis januaro 2015 devis esti

finfarita ankaŭ ampleksa raporto kun financaj detaloj kion kunordigis ankaŭ Maja Tišljár. Tiel ke la projekto estis definitive finita fine de januaro 2015. Ĝi ne nur estas unu el la plej grandaj prilingvaj portaloj en interreto, sed ĝi konfirmas ankaŭ grandegan solidaron de esperantistoj, ĉar la mono de la projekto ne sufiĉis por ĉiuj tradukoj kaj multaj estis faritaj de esperantistoj volontuloj. La portalo estas vaste uzata kaj jam en la fino de 2014 ĝi havis 100.000 vizitantojn. Sukceso estis ankaŭ helpo de pluraj individuaj kaj kelkaj asociaj personoj kiuj subtenis la projekton per mondonacoj, ĉar ni devis mem investi 25% de la kostoj. Pri tio vi povas legi en novembra numero de EB. La portalo en Esperanto estas atingebla ĉe <http://lingvo.info/eo/>

Okaze de la Eŭropa Tago de la Libro EEU kune kun sia slovena partnero Asocio por Eŭropa Konscio organizis prezenton de la portalo en Maribor kaj pri tio aperigis informon inter la eventoj dediĉitaj al tiu tago kadre de la paĝaro de Konsilio de Eŭropo.

Rilate la tutpopolan iniciaton al Eŭropa Komisiono ke la eŭropanoj esprimu sian subtenon al nia ideo kanti eŭropan himnon en Esperanto laŭ la teksto de Umberto Broccatelli la estraro skribis plendleteron al eŭropa ombudsmano. Bedaŭrinde ankaŭ li malakceptis la plendon kaj pro tio nia iniciato definitive fiaskis.

Maja kaj Zlatko Tišljár ellaboris komence de la jaro 3 projektojn por financado de EU ĉe Eŭropo por Civitanoj. Bedaŭrinde neniu estis akceptita kaj fine de la jaro ili ellaboris novan projekton por la regula inancado de eŭropaj platformaj asocioj de neregistaraj organizaĵoj kiu ankaŭ ne estis akceptita. Ni skribos novajn projektojn en 2015.



La membroj de la estraro, sed ankaŭ aliaj aktivuloj kaj assembleaj membroj partoprenis en pluraj neesperantistaj politikaj, sciencaj kaj interesorganizaj konferencoj kaj aranĝoj diverstipaj. Aparte elstaris la laboro de Jozef Reinart kaj Petro Baláž en Slovakio kaj de nia prezidanto Seán Ó Riain.

Petro Baláž kaj Jozef Reinart havis plurajn renkontiĝojn kun politikistoj en Slovakio preparante la proponon por UK en Nitra 2016 kaj la podian diskuton en Ekonomia Forumo en Krynica.

Seán Ó Riain prelegis en Bruselo la 27an de aprilo pri Esperanto – lingvo de estonteco kaj partoprenis en lingva diskuto okaze de filmo pri lingvaj konfliktoj en Kibekio la 25-an de novembro.

Maja Tišljár, Seán Ó Riain kaj Petro Baláž partoprenis en grava konferenco pri multlingvismo organizita de Eŭropa Komisiono en Florenco (Italio) okaze de Tago de eŭropaj lingvoj la 25-an kaj 26-an de septembro je la invito kaj kosto de Eŭropa Komsiono. Zlatko Tišljár kaj Petro Baláž partoprenis en Somera E-Studado en Nitra (SK) kaj Petro organizis la KAEST-

konferencon en novembro en Modra Harmonia en Slovakio. Zlatko Tišljar partoprenis en renkontiĝo de E-verkistoj en Hrašćina (Kroatio) en septembro.

Elstaris ankaŭ ĉi-jare kvalita aktiva partopreno en la 24-a Ekonomia Forumo en pola Krynica en kiu refoje estis organizita tre videbla stando de EEU, apud kiu pasadis dum la 3 tagoj (3-5. sept) pli ol 2000 partoprenintaj forumanoj inter kiuj ŝtatestroj, gravaj politikistoj, ekonomikistoj, bankistoj kaj pli ol 400 ĵurnalistoj. EEU organizis ankaŭ diskutpanelon pri la temo „Multlingveco en Eŭropo – kiel ĝin konservi?” en kiu prelegis Seán Ó Riain (Irl), Jan Figel (iama membro de Eŭropa Komisiono el Slovakio), Edmund Witbrodt (pola senatano) kaj Stefan MacGill (Hu- UEA). Estis aparta sukceso havi du tiel gravajn politikistojn en nia panelo. Kune kun polaj esperantistoj gvidataj de Halina Komar ili partoprenis ankaŭ en aliaj aranĝoj de la Forumo.

Okaze de balotoj por Eŭropa Parlamento en junio EEU organizis kampanjon pri leterskribado al la kandidatoj en la balotoj. Pro tiu kampanjo al la kandidatoj skribis leterojn minimume 5 landaj asocioj en EU.

Gravaj atingoj por Esperanto en Eŭropo en kiuj EEU ne rekte partoprenis:

En Pollando la agado de pola EDE (Eŭropo-Demokratio-Esperanto) kune kun aliaj polaj esperantistoj kaj ankaŭ helpe de EEU estis atingita tre grava rezulto. Pola Kulturministerio enskribis Esperanton kiel nematerian kulture heredaĵon de Pollando, kio estas la unua tiaspeca agnosko por Esperanto en la mondo. Ĉefmerito iras al pola senatano Edmund Witbrodt kaj pola esperantisto: Kazimierz Krzyżak.

En 2014 junio okazis balotoj por Eŭropa Parlamento en kiuj partoprenis ankaŭ EDE (Eŭropo-Demokratio-Esperanto) en Francio kiu gajnis pli ol 33.000 voĉojn (5000 pli ol en 2009). Por Esperanto gravas ke parlamentanojn ricevis du partioj kiuj subtenas Esperanton (Nova Slovenija kies prezidantino estas Ljudmila Novak – esperantistino), OEDP el Germanio. Ankaŭ kelkaj polaj parlamentanoj estas konataj kiel simpatiantoj de Esperanto. La plej grava estas ke la Eŭropa Komsionano Vytenis Povilas Andriukaitis el Litovio estas esperantisto. Okaze de Eŭropa Tago de Lingvoj Esperanto-asocioj organizis 9 aranĝojn en 7 eŭropaj landoj kiuj estis listigitaj en aparta listo de Konsilio de Eŭropo inter pli ol 500 aranĝoj entute tra la tuta Eŭropo.

La honora membro de EEU Etsuo Myjoshi starigis fondaĵon CIGNO kiu premias unu landan asocion kiu sukcesis atingi plej multajn sukcesojn en la informado pri Esperanto ekster la movado. En 2014 estis transdonita la premio al Kroatia E-Asocio, dum la EEU-kongreso en Rijeka (Kroatio).

Speciale interesa fenomeno en kiu parte partoprenas EEU sed ankaŭ stimulas ĉiujn aliajn E-organizaĵojn estas ĉiam pli granda nombro da projektoj financataj de EU kiujn ellaboris kaj projektis E-organizaĵoj aŭ al E-ligitaj entreprenoj. En 2014 krom en la projekto Lingvo.info kun 8 partneroj sukcese estis organizitaj 2 projektoj kadre de Grundtvig (unu en kiu partoprenis partneroj en Germanio, Pollando, Nederlando kaj Hungario kaj alia kun partneroj el Hungario, Bulgario, Italio kaj Rumanio).

Enmovada Agado

En 2014 okazis la 10-a kongreso de EEU en Kroatio, en urbo Rijeka de la 6-a ĝis la 12-a de julio. En la kongreso partoprenis 146 kongresanoj el 21 landoj. La kongreso estis tre riĉenhava kun pluraj prelegoj de fakuloj rilataj al la ĉeftemo. „Justa Eŭropo kun justaj lingvaj rilatoj”.

Inter la prelegintoj estis ankaŭ membro de kroata parlamento, prof. Milorad Pupovac. Krome okazis deko da aliaj prelegoj. Komence de la kongreso oni prezentis novan kodo-diskon kun ĉiuj himnoj de EU-landoj kaj la eŭropa himno. Dum la kongreso okazis laboro de la Asembleo de EEU, kiu havis du kunvenojn kaj akceptis la raportojn pri la laboro kaj laborplanojn kaj financajn raportojn. Krome la Asembleo elektis novan estraron de EEU por sekva trijara mandato: La prezidanto restis Seán Ó Riain, la sekretario Zlatko Tišljár, la vicprezidantino kaj kasistino Flory Witdoeck kaj la membroj Nikola Rašić kaj Petro Balaž. Aldoniĝis nova sesa membro Sandra Schweder el Germanio.

Ankaŭ la estraro havis unu kunsidon. La kongreso havis ankaŭ tre riĉan kulturalan programon ĉiutage. Merkredon estis ekskursita tago dum kiu parto de kongresanoj vizitis aŭtobuse istriajn urbojn kaj parto per ŝipo vizitis insulon Krk. La kongreso akceptis du rezoluciojn: unu rilatan al la kongresa temo kaj alian ĝeneralan. Ĝi havis tre pozitivan reeĥon en la publikaj medioj de Kroatio. Aperis dekoj da gazetartikoloj, radio kaj TV-raportaĵoj.



La aŭspicianto de la kongreso estis kroata ŝtatprezidanto Ivo Josipović kiu transdonis tre pozitivan mesaĝon al la kongreso kaj akceptis esperantistan delegitaron de 7 personoj la 11-an de junio. La unuan de julio okazis konferenco por ĵurnalistoj kunvokita de la urbestro de Rijeka en kiu partoprenis 5 ĵurnalistoj.

Lige al la kongreso, en Zagrebo EEŬ kun Kroata E-Ligo organizis ĵurnalistan konferencon pri WikiTrans tradukmaŝino en kiu oni prezentis la ĉefaŭtoron prof. Eckhard Bick. Ankaŭ pri tio aperis aro da artikoloj en kroatia gazetaro kaj aliaj medioj. Prezidanto de EEU prelegis pri Eŭropa-E-movado en Zagrebo por tieaj esperantistoj la 10-an de junio.

La estraro kunsidis la 15-an de marto en Bruselo kiu interalie decidis pri nova adreso de EEU kaj posta kongreso de EEU en Nitra 2016. La dua kunsido okazis dum la kongreso en Rijeka. EEU organizis kampanjon pri serĉado de landaj asocioj pli fortaj kiuj estus sponsoroj de landaj asocioj en danĝero. Ni kontaktis tiusence la italan, belgan kaj francan asociojn por sponsori la kipran, maltan kaj rumanan asocion.

La Eŭropa Bulteno regule aperis 11 fojojn (junia-julia numero estis komuna) ĉiu je 12-18 paĝoj. Ĝin ni publikigis en la paĝaro de EEU www.europo.eu. Redaktis ĝin la sekretario kaj teknike aranĝis Maja Tišljár. Dum la kongreso en Rijeka estis solene transdonitaj paperaj versioj de la kompleta EU-bulteno de sia komenco al sinjoro Tuidel el Internacia E-muzeo de Vieno.

La kunlaboro kun UEA estis bona kiel kutime: Niaj reprezentantoj ĉeestis en kelkaj aranĝoj de UEA (malfermaj tagoj de UEA, en la komitatkunsidoj kaj komisionoj de UK en Bonaero, en la Eŭropa Komisiono de UEA) kaj kunorganizis kun UEA (kiu helpis finance) la partoprenon en Eŭropa Ekonomia Forumo en Krynica (Pollando), kie ĉeestis nome de UEA

Stefan MacGill, Seán Ó Riain, Petro Baláž kaj Zlatko Tišljar verkis artikolojn por UEA-revuo Esperanto-Revuo.

La landa agado estis kontentiga ĉefe en kunlaboro rilate la kongreson en Rijeka kaj partopreno de iliaj assembleanoj.

La estraranoj partoprenis ankaŭ en aranĝoj de landasj asocioj:

1. en Somera E-Studado en Nitra (Slovakio) partoprenis Zlatko Tišljar havante unu prelegon kaj gvidante komencantan kurson (12-19-a de julio)
2. en ĉefkunveno de kroataj esperantistoj partoprenis Zlatko Tišljar en majo
3. Flory Witdoeck partoprenis en jarkunveno de Belga E-Asocio.

Bona kunlaboro pludaŭris kun Germana E-Asocio, kiu plu administras salajron de nia direktorino Maja Tišljar. Krome ni realigis preskaŭ ĉiujn punktojn de nia laborplano por 2014.

Prizorgadon de la retpaĝaro pri kio zorgis Maja Tišljar kiu ankaŭ kreis kaj zorgis pri la nova paĝaro pri la kongreso en Rijeka. Ŝi kaj la sekretario organizis la 10-an jubilean EEU-kongreson en Rijeka (Kroatio). Estis prizorgata kongresa paĝaro <http://eeu-kongreso.webnode.com/> kaj aperis paperforme kongresa libro. Loka kongresa Komitato havis du kunsidojn en Rijeka kaj la membroj vizitis la urbestron kaj la regionestraron por certigi subvenciojn por la kongreso. Juna entrepreno el Zagrebo organizis 4-tagan antaŭkongreson en Biograd na

moru kiun partoprenis 15 personoj.

Ankaŭ la tuta administrado (prizorgo de dokumentaro, ellaboro de novaj projektoj kaj raportoj, prizorgo de financoj estis plene plenumita, kion prizorgis Maja Tišljar kaj Flory Witdoeck. La estraro ankaŭ preparis ampleksan laborplanon por la 2015-a jaro kiu aperis en la novembro numero de EB.

Maja Tišljar partoprenis en unu kunveno de agentejo EACEA de Europa Komisiono rilate financadon de neregistaraj organizoj.

Financoj

La kotizpagado en 2014 estis malbona: Pagis nur la jenaj asocioj: Belgio, Aŭstrio, Danio, Irlando, Italio, Malto, Nederlando, Rumanio, Slovenio. Ĉiam pli da asocioj evidente malatentas siajn devojn.

La jaro finance estis tre bona, ĉar ni ricevis la duan parton por la projekto Lingvo.info kaj donacojn por la sama projekto. La direktorino daŭre zorgas pri ellaboro de novaj projektoj kaj partopreno en pluraj konkursoj. Finance kontribuis al EEU ankaŭ UEA kaj Etsuo Myjoshi por la bonege realigita partopreno en Ekonomia Forumo en Krynica (Pollando).

Flory Witdoeckt ellaboris la financon raporton por la financaj instancoj de Belgio por 2013 kaj por la asembleo en Rijeka.

Ni sukcesis pluteni la profesion laboron de Maja Tišljar (kiu ricevas salajron en Germanio, kie ŝi loĝas pro kontrakto inter EEU kaj GEA). Tio tre gravas, ĉar la kondiĉo por ricevi financadon kaj pli grandajn projektojn estas ke la asocio jam havas almenaŭ unu profesiulon kaj la amplekso de laboroj ĉiam pli vastiĝas.

Zlatko Tišljar, sekretario de EEU

AVANTAĜOJ DE E-MOVADO (INTERNAJ FORTOJ)

En la januara numero mi komencis SWOT-analizon de la Esperanto-Movado kaj prezentis la unuan el la kvar elementoj de la analizo: la malavantaĝojn, (internajn malfortojn). Nun mi surtabligas la duan parton: La avantaĝojn:



1. Forta ideologio kiu diras ke per esperantigo de la mondo oni grave influos al la monda paco. La ideologio ne estas detruenda ĉar ja ne eblas pruvi ĉu ĝi pravas aŭ ne, sed multaj homoj ŝatas ĝin kaj kiam ili akceptas ĝin, ili ĝin ne forlasas. Ĝi estas la ĉefa kaŭzo de kuntenado de la socia grupo de esperantistoj. La historio montris ke ĝin ne eblas detrui, malgraŭ ĉiuj eksteraj malfavoraĵoj kiel militoj, totalismaj reĝimoj k.s.
2. La komunumo de esperantistoj estas multoble pli edukita ol averaĝaj civitanoj en kiu ajn lando. Klare ke inter esperantistoj ne ekzistas analfabetoj kaj ke granda plimulto estas sufiĉe alte edukita.
3. Aparte elstaras neproporcie alta kvanto da bonegaj fakuloj pri informadiko, kiuj kreas por Esperanto modernajn ilojn kiujn ofte eĉ grandaj nacioj ne havas. La fenomenoj kiel WikiTrans au Esperanta wikipedio montras tiuspecan superecon de E-komunumo
4. Esence pli alta kono de lingvoj ĝenerale. Meza kono de lingvoj ĉe plenkreskaj esperantistoj estas inter 3 kaj 4 kaj tiom altan proporcion verŝajne ne havas iu ajn popolo.
5. Pro la unua punkto, esperantistoj kapablas kiam temas pri iu perspektiva afero por E-movado multe pli efike krei internacian kunlaboradon ol aliaj. Ekz. la sukceso pri propono de poloj al UNESCO proklami la jaron 2017 Zamnehof-jaro. Dum tri tagoj ducento da esperantistoj el deko da landoj harmonie kunlaboris kaj kreis ion kio teorie ne estus ebla se tion organizus profesia entrepreno. Sekve Esperanto-komunumo kapablas tre efike eluzi la modernajn internaciajn rimedojn por atingi tre efikan internacian kunlaboron.
6. Kvankam laŭkvante la komunumo vere ne estas granda, ĝi estas tre bone distribuita tra la tuta mondo. Verŝajne eĉ ne romaoj kaj judoj havas tian distribuon tra la mondo.



konsciante ke tiu scienco evidente uzas tro da subjektiveco – perdas la senton de oboe al scienca aŭtoritato kaj pretas okupiĝi pri alternativaj sciencaj esploroj, kio povas konduki al gravaj novmalkovroj.

Zlatko Tišljarić

KUNLABORO DE LA KOMISIONO DE TEJO PRI EKSTERAJ RILATOJ KUN EEU

TEJO-KER kaj EEU kunlaboros kampe de agadoj ĉe la Eŭropa Komisiono. EEU-n kaj la agadon de EEU regula leganto de la Eŭropa Bulteno certe jam bone konas, sed kion faras TEJO-KER? Kiel tio rilatas al la agadoj de EEU?

Mi pensas ke mi ne devas detale prezenti al vi la pli ol 30 kaptajn Komisionon de TEJO pri Eksteraj Rilatoj (TEJO-KER), ĉar verŝajne vi jam aŭdis pri la sukcesoj de TEJO-KER en la pasintaj monatoj ekzemple ke Lukasz Zebrowski estis elektita el 760 kandidatoj tra tuta Eŭropo, por dek lokoj en altranga Afrika-Eŭropa trejnado. Aŭ pri tio, ke TEJO estis elektita por la gvidorgano de IKRJO (Internacia Kunordiga Renkontiĝo de Junularaj Organizo) aŭ pri tio ke Michael Boris Mandirola de TEJO estis nomumita de la Forumo Junulara Eŭropo por la Konsulta Konsilio pri Membro-Aliĝoj. Aŭ pri la februara kampanjo okaze de la Internacia Tago de la Gepatra Lingvo, kun pli ol dek mil atingitaj personoj.

Kompreneble, TEJO-KER faras multe pli, se vi interesiĝas pri la agado, sekvu la raportojn en la cirkuleroj de TEJO ĉe: <http://tejo.org/dokumentoj-kategorio/cirkuleroj/>.



En ĉiuj tiuj funkcioj membroj de TEJO-KER ofte renkontas altrangajn junajn politikistojn de Eŭropo kaj de la tuta mondo. Ekzemple unu juna politikistino proponis, ke ŝi emus helpi nin havi bonajn rilatojn kun la Eŭropa Komisiono rilate al multlingveco. Sekve ŝi demandis por ni pliajn detalojn pri multlingveco en la Eŭropa Komisiono, kaj ni eksciis,

ke Navracics havas unu dungiton specife dediĉitan por multlingveco. Do, ni ekhavis la demandon: kiel pluri? Kio estu nia plano por la sekvaj kvin jaroj? Kion ni emas atingi kaj kiel? Tio donas bonan perspektivon por kunlaboro kun EEU.

Ĉar EEU havas multe pli da sperto, kono pri la Eŭropa Komisiono kaj havas jam konstruitan kontaktoreton, TEJO-KER kontaktis EEU por komune cerbumi, plani kaj realigi.

Tio estas la nuna stato, kaj ni esperas ke en la sekvaj monatoj ni povos ne nur rakonti pri planoj, sed ankaŭ pri sukcesaj agadoj. TEJO-KER kore dankas al EEU la malfermitecon kaj la emon kune agadi por nia komuna celo.

Se vi emas helpi, interesiĝas pri komuna agado, vi estas ĉiam bonvena skribi al ker@tejo.org!

Veronika Poor

GRAVA MERITO DE ESPERANTISTOJ EN NOWY SĄCZ POR DISKONIGI EŬROPAN HIMNON ESPERANTLINGVE



Kalkulante la eventojn, kiam estis organizita kantado de Eŭropa Himno en Esperanto pro nia iniciato aŭ per niaj kantistoj, oni devas konstati, ke ĝuste esperantistoj en nia Sonĉa Regiono, havas la plej grandan meriton en

popularigo de Esperantaj vortoj de la europa himno:

2011 – okazis tie unua publika prezento de la himno, kantata de kunligitaj korusoj, kun akompano de soldata orkestro, sur la centra placo de la urbo Nowy Sącz (okaze de Tago de Eŭropo dum Tutpollanda E- Kongreso,

2012 – nia kantensemblo „Junaj voĉoj” ludis kaj kantis Eŭropan Himnon en Berlino, dum Komuna E- Kongreso DE+DK+PL

2013 - Regiona Centro de Kulturo SOKÓŁ en Nowy Sącz, la lerneja ensemblo prezentis por-european spektaklon, kiu komenciĝis per eŭropa himno kantata de lerneja koruso

2013 – dum Zamenhofaj Tagoj organizitaj de Regiona Buroo de nia Organizaĵo en Wrocław, kantis la himnon koruso de senjoroj

2013 - vizitante Polan Ambasadon en Kopenhago nia folkloro ensemblo „SADECZANIE” kantis la himnon por funkciuloj de nia Ambasadato kaj aliaj najbaraj Ambasadatoj invititaj partopreni la eventon,

2015 – la 17-an de februaro, okaze de festa fermo de „Senata Ekspozicio” en Stary Sącz, en Kulturcentro Ada Sari eŭropan himnon kantis Integracia Koruso, organizita de Gniazdo (nesto) por infanoj neplenlertaj kune kun sanaj. Ili mem preparis verdajn stelojn, per kio ili ornamis siajn ĉemizojn, kantis sen kartetoj, kun granda entuzjasmo – vidu la foton

2015 – la 15an de majo estas planata kuna kantado de eŭropa himno maje 2015 dum Malfermo de Europa Festivalo de Esperantaj kantoj, organizota en Wroclaw jam la 3-an fojon de nia Regiona Buroo de Centro de Interkultura Edukado.

Halina Komar

ESPEARNTO EN RUMANIA TELEVIDO



La 21-an de Februaro, la TV-kanalo DIGI 24 elsendis raporton titolitan "Esperanto en Rumanio". Ĝin faris Alida Mocanu. Partoprenantoj estis esperantistoj el la ĉefurbo, Bukareŝto, menciitaj en la Jarlibro de UEA, interalie profesoro Marian Constantinescu, Nagy E. Iosif kaj Marian Vochin. La elsendo daŭris duonhoron.

Marjan Vochin

ESPERANTO – KIEL FAMILIA LINGVO

Personaj konatiĝoj, renkontiĝoj pere de Esperanto ofte rezultas geedziĝon...

Ĉe tiuj internaciaj geedziĝoj – sekvante la vojon de la plej facila solvo – dum iu tempo hejme oni uzas Esperanton, kaj ankaŭ la naskiĝontaj infanoj aŭtomate ellernas ĝin. Por ili Esperanto estas iuspeca "familia komunika lingvo" - apud la aliaj uzataj lingvoj. Tiuj infanoj kompreneble parolas la lingvon de sia loĝlando, kaj ili ofte ellernas ankaŭ la lingvojn de gepatroj.

La nocio kaj nivelo de "familia lingvo" ne estas la sama kiel "lingvoscio kun gepatra nivelo" (= *tre alta nivelo*), ja la familia lingvo rilatas kutime nur al la persona kontaktado kaj informinterŝanĝo, tamen ĝi estas simile grava por la anoj de tiu komunumo, ja ĝi apartenas al ilia propra personeco.

La familioj uzantaj hejme Esperanton organizas ĉiujaran kunvenon, komunan feriadon. La ĉi-jara aranĝo "Renkontiĝo de Esperanto-Familioj, REF" okazos en la centro de Eŭropo, en Hungario, inter 15-26-a de julio, apud la urbo Esztergom.

Interesa, nova videoregistraĵo ĉe <https://www.youtube.com/watch?v=UzDS2WyemBI> montras interjuon kun ses junuloj, uzantaj Esperanton en familia medio ekde sia naskiĝo. La filmeto havas subtekstigitan tradukon en 27 lingvoj. Kiam oni rakontas pri Esperanto al eksterulo, indas doni retejan adreson kun nacilingva enhavo por eventualaj pliaj informoj.

Szilvási László

ILEI: RENKONTOJ KUN HISTORIO, PENSOJ PRI LA PACO

La 48-a Konferenco de ILEI okazos en Oostende, Belgio, 17-25 Julio 2015.

(<http://www.ilei.info//agado/Ostendo2015.php>).

Flandrio gastigas la konferencon kiel trezorejo konservanta memorojn kaj memoraĵojn el ŝlosilaj bataloj de ambaŭ mondmilitoj, pintvalorajn verkojn de arkitekturo kaj pentroarto el la kultura historio de Eŭropo kaj spurojn de ĝia ekonomia kaj socia evoluo. Ĉio ĉi kaj multo alia malfermiĝos al konferencanoj por ĝuo dum la konferencaj ekskursoj. Kaj por pripenso dum konferencaj prelegoj kaj diskutoj traktantaj la konferencan temon: *Granda paco post la granda milito*.



La konferenco akiris moralan kaj materialan subtenon de la urbo Ostendo, kiu sian prosperon apogas grandparte per turismo rekonante Esperanton kiel favoran faktoron por la turisma ekonomio kaj malfermiteco de la urbo al la tuta mondo. La forta loka E-grupo *La Konko* akiris kaj plu flegas tiun renkonon per bone organizata kaj trafecelita malferma agado. Tio garantias ankaŭ bonan organizon de la konferenco. Ĉion necesan por la konferenco - konferencajn salonojn, dormoĉambrojn, manĝojn, spacon por la vespera programo kaj lingva

festivalo - disponigas sub la sama tegmento la populara kaj pasinjare renovigita junulargastejo *De Ploate* (*Plateso* en la flandra dialekto).

Programo

Sekvante la tradiciajn programliniojn de ILEI-konferencoj - faka/eduka, organiza, kutura/distra/turisma - ĉefaj programeroj en Oostende estos:

- Interkona frandvespero, la enkonduka vespera kunveno de la konferencanoj, kiam ĉiu prezentas sin kaj sian kulturon regalante siajn kolegojn per tipaj mangaĵoj kaj trinkaĵoj el sia mondoparto; aliaj distraĵoj okupos ĉiun alian konferencan vesperon;
- Solena inaŭguro en la Urbodomo sekvata de koktelo regale de la urbo al la konferencanoj
- Nacia posttagmezo kun muzika kaj baleta programo sur la urboplaco;
- Lingva festivalo, malferma ankaŭ por neesperantista publiko, dum kiu konferencanoj prezentos kaj provlecione instruos erojn el sia lingvo kaj prezentos trajtojn de diversaj kulturoj el ĉiuj mondopartoj;
- ILEI-simpozio pri la temo *Lingva justeco kaj paco: Kiaj defioj por la nuna mondo*, en kiu prelegos esperantistaj kaj neesperantistaj fakuloj (legu pli: <http://www.ilei.info/konferenco/2015/SimpozioOostende2015.pdf>);
- Prelegoj, diskuttrondoj, laborkunsidoj, laborgrupoj, atelieroj, kurso por E-komencantoj el diversaj landoj, ekspresaj lecionoj de la loka lingvo;



- Konferenca bankedo en tipa flandra restoracio kun flandra menuo kaj muzika programo de loka esperantistino;
- Riĉa ekskursiva programo kun promenekskursoj tra la urbo kaj diversaj duontagaj kaj tuttagaj ekskursoj tra okcidenta Flandrio kaj Bruselo kondukantaj al diverskampaj kaj diversepokaj vidindaĵoj kaj konindaĵoj flandraj, belgaj kaj eŭropaj.

La konferenca programo finiĝos vendredon, 24.07.2015, per adiaŭa vespero. La vera adiaŭo kun la gastiganta urbo okazos sabaton, 25.07.2015, post la matenmanĝo, kiam la konferencanoj karavane transiros al UK en Lille per duhora trajnveturo.

Aliĝi

La unua aliĝperiodo kun malplej altaj kotizoj kaj loĝprezoj finiĝas la 31-an de marto (plilongigita kompare de la unue publikigita limdato kiu estis monaton pli frua).
Bonvenon en Oostende kun ILEI!

Radojica Petrović

INTERNACIA JUNULARA FESTIVALO 2015 EN BRUSSON (ITALIO)



La Internacia Junulara Festivalo estas unu el la plej amataj kaj atendataj junularaj renkontiĝoj en Eŭropo. Oni spiras la specialan esperantistan etoson: miksaĵon el amikeco, amuzeco kaj diversecrespekto. Ĝin partoprenas kaj spertaj esperantistoj kaj komencantoj kaj tre facilas amikiĝi kun italoj kaj kun alilandanoj.

Ĉiujare IEJ (Itala Esperantista Junularo) elektas temon por la festivalo pri kiu estas organizataj

prelegoj, diskutrondoj kaj gruplaboroj. La distra programo estas taga kaj nokta, ankaŭ okazos lingvokursoj de la itala, de Esperanto kaj de aliaj lingvoj, por komencantoj kaj progresantoj. Dum la vespera programo estos koncertoj, spektakloj, internacia vespero, nokta urbumado ktp. Krome tutnokte la ĉefaj distrejoj estos la trinkejo, la diskejo kaj la plej trankvila gufujo. Krome, kunlabore kun la lokaj institucioj ni strebos vizitigi al vi la plejbelajn de la ĉirkaŭaĵoj. Kutime okazas duontaga ekskurso kaj tuttaga ekskurso. Tamen, kiel konate, nenio endas dum la festivalo: ĉiu memdecidas kiel uzi sian tempon. Grava eco de la festivalo estas la zorgo kiun ekde ĉiam oni havas difinante la kotizojn laŭ aĝo kaj lando: tra la jena [ligilo](#) eblas trarigardi la kotizojn por la jaro 2015.

Ĉi-jare ĝi okazos de la 1-a ĝis la 7-a de aprilo.

RETREUVUO »ESPERANTO ILUSTRITA«

Ĉu vi konas la retejon “Esperanto Ilustrita”? Temas pri virtuala revuo, kiu ĉiutage liveras tutmondajn novaĵojn, recenzojn, kuriozaĵojn, muzikfilmojn kaj aliajn interesajn aferojn. “Esperanto Ilustrita” alireblas ĉe la adreso www.esperantoilustrita.blogspot.com.

Fabiano Henrique

DUVOĈA POLEMIKO

Observante en intereto polemikon je temo de ESPERANTO, ni - kvazaŭ dupersona teamo – deziras aldoni niajn proverbajn tri groŝojn. Ĉar kaŭzo de tio, ke E-o ne iĝis ĝis nun la lingvo de universala komunikado, troviĝas en esperantistoj mem, srikte en E-agantaro, kiu spite al nomo de la lingvo E-o ne montras simptomojn de ESPERO por ties disvolvigo en la mondo, sed sin enfermas kvazaŭ en E- katakombojn. Ili multe kaj neefektive polemikas, sed tre malmulte, neaktive politike agadas por popularigo de lingva ideo de L. Zamenhof.

La esperantistoj ekz. tiuj regantaj la anglan lingvon, sin direktas per egoismaj relativecoj kaj konsideras sin kiel speciala ekskluziva grupo, plene kontenta pro tio, ke ili povas libere komunikiĝi kun ĉiuj similaj esperantistoj en la mondo, do por ili ne necesas tiun elitajn mallarĝan rondon disvolvigadi.

Esperantistoj ne realigas ankaŭ eĉ elementan ideopremison de la lingvokreinto L. Zamenhof, por ke E-o ligu homojn en harmonia konsento kaj amikeco, sed diversmaniere dividas kaj kvereligas sin reciproke. Se ekz. la agantoj de EDE – germanaj kaj francaj povus prezenti per iuj konkretaj sukcesoj disvastigadon de E-ideo, do certe ili atingus plimulte da voĉoj de apogo en balotado por la Eŭropa Parlamento, en kiuj ili partoprenas.

Aktivaj agadoj de UEA por E-o finiĝis je prezidanto Ivo Lapenna, kiu fare de sia persona engaĝiĝo dum VIII-a Ĝenerala Konferenco de UNESKO en la jaro 1954 en Montevideo kaŭzis akcepton de konata rezolucio, kiu en sia 4-a punkto vokis ĉiujn membroŝtatojn al enkonduko de E-lernado en lernejojn.

La sama prezidanto ankoraŭ foje en la 1966-a jaro prezentis al Unuiĝintaj Nacioj „proponon pri solvo de lingva problemo helpe de E-o”, kiun subskribis tiam 71 milionoj da homoj en 74 landoj, inter ili multe da elstaraj, signifoplenaj politikistoj, lingvistoj, artistoj kaj ĵurnalistoj. Ĉu de tiu tempo estas videbla UEA agado ekster organizataj multekostaj UK-oj, en kiuj povas partopreni nur nemultaj, pli bonstataj esperantistoj? Nuntempe UEA fakte nur administras kaj ne agas por disvastigi E-on.

UEA ne plu engaĝiĝas en politikajn agadojn, do rezulte de tio estiĝis perditaj kelkaj favoraj ŝancoj por E-o kiel:

1. Oni ne utiligis tre profitan voĉdonadon en la EU Parlamento en la jaro 2004, kiam por E-o kiel helplingvo sin deklaris eĉ 43% da eŭroparlamentanoj. Per aktiva, lerta agado de UEA, post tiu signifoplena voĉdonado, plua simila estus povinta doni al E-o ne 43%, sed pli ol 50% da voĉoj de apogo, kio rezultigus, ke la lingvo E-o jam iĝus la laborlingvo de Eŭropa Parlamento. En tempo kiam UEA tiun revelacian rezulton de voĉdonado traktis kun pasiva indiferento, la brita „lobby”, kiu en la sama voĉdonado atingis la plej

malmultan kvanton da voĉoj, ekagis energie, ofensive por tiun rezulton - malutilan al la angla lingvo – ŝanĝi. La efekto de tiuj agadoj estis akceptita far Eŭropa Parlamento la 24-an de marto 2009 per rezolucio pri „Multlingveco, la atuto por Eŭropo kaj komuna sindevigo”, kiu praktike daŭrigis dominadon de la angla lingvo en EP.

2. Fare de sia pasia kaj malaktiva agado ĝi marĝenigis la ideon de E-o kaj pro tio ne akiris vastan internacian apogon dum klopodoj pri aljuĝo de Paca Nobelpremio okaze de UEA-centjariĝo, kio certe plifaciligis disvastigadon de tiu ideo en la mondo.
3. UEA torpedis partoprenon de observantoj en UK de E-o; por eŭroparlamentano Janusz Lewandowski en Havano kaj por Joanna Skrzydlewska kaj Jan Kozłowski en Kopenhago. Se oni ebligus al tiuj eŭroparlamentanoj partoprenon en tiuj kongresoj, certe E-o profitus el tiuj personoj kiel advokatoj de E-o en la EP, simile kiel iam pro favoro al E-o de la vicprezidanto de la Ligo de Nacioj – Inazo Nitobe, kiu dum 13-a UK en Prago en la 1921 kaŭzis, ke li sin engaĝis por akcepto de E-o far ĝia (kongresa) rezolucio, kiel la dua universala lingvo, kiu taŭgas por esprimi ĉiujn sentojn kaj pensojn: sociajn, sciencajn, politikajn, religiajn, kaj aliajn. Oni ne povas esti tute indiferenta politike, kaj ĉi tie la esperantistoj ofte kun plaĉo ŝirmante sin per slogano de nepolitikeco de nia lingvo, malformas, aliigas la ĝustan penson de la kreinto de E-o L. Zamenhof, kiu tute ne revis pri tia nepolitikeco.

Andreas Kuenzli kontestas rajton de Pollando al agnosko de E-o kiel sia kultura heredaĵo. Eble li ne scias, ke kiam Ludoviko Zamenhof publikigis en 1887-a jaro la unuan lernolibron de E-o, do tiam Pollando ne ekzistis sur mapoj de Eŭropo, ĉar pli ol 100 jarojn ĝi estis dispartigita fare de tri okupantoj, en tio ankaŭ rusia. Ne nur L. Zamenhof sed ankaŭ poloj estis la civitanoj de fremda por ili rusia ŝtato. Krom L. Zamenhof vivis tiam sur pola teritorio kelkaj milionoj da judoj, kiuj laboris, agadis kaj riĉigadis polan kulturon. Do ni demandas Andreas-on Kuenzli, kial d-ro L. Zamenhof devus esti escepto, kaj lia kreopovo ne rajtus pliriĉigadi la polan kulturon, des pli, ke li tie naskiĝis kaj loĝis inter konkeritaj popoloj, mem apartenante al ili? Ja enskribo de „lingvo E-o, kiel la portanto de Esperanta kulturo sur landan liston de nemateria, kultura heredaĵo de Pollando”, ne malhelpos al tio, ke poste same faru Rusio kaj Israelo, ĉar tiutempe Zamenhof estis rusia civitano kaj laŭ deveno judo. Ni ankaŭ ne kontestas la volon de kreinto de E-o, kiu rezignis pri aŭtoreco de la lingvo E-o kaj agnoskis, ke ĝi restos neŭtrala, kiel nenies individua proprieto, tamen komune servanta por ĉiuj. Kio do faras obstaklon, ke ĝi (E-o) ne fariĝu kiel nemateria kultura heredaĵo de la Mondo agnoskita fare de UNESKO?

Polaj Templanoj el pasinta jarcento de 30-aj jaroj proklamadis, ke ili havas du lingvojn: unuan nacian polan kaj duan ĉies-homan – Esperanton. Ĉu tio ja ne estas klasika ekzemplo de neŭtraleco de E-o? Kaj ĉu tio ne estas idealo, por ke ĉiu nacio proklamadu, ke ĝi havas du lingvojn: SIAN PROPRIAN NACIAN KAJ ĈIES-HOMAN – ESPERANTON, por komunikado kun la tuta homaro de la Mondo? Venis jam tempo por fini tiun malpli efikan, polemike kritikan agadon de esperantistoj kaj komenci realan, konkrete konstruan agadon, kiel sekvas:

1. Utiligadon de proksimiĝanta jubilea 100-jara UK en Lilo, por devigi estraron de UEA prilabori realan 10-jaran planon de agadoj, celante disvastigadon de E-o en la mondo, ĉefe:
 - a) Vasta disvolviĝo de propaganda agado pri la lingvo E-o en amaskomunikiloj, lernadoj kaj prelegoj, publikigado de bultenoj kaj informiloj, pri E-o, plibonigo de alireblo kaj aĉeteblo de lernolibroj kaj vortaroj, precipe inter junularo, por konvinki kaj kuraĝigi ĝin;
 - b) Reaktualigo de prezento de la propono far UEA al UN el la jaro 1966 pri „Solvo de lingva problemo helpe de E-o”, al kiu UN ne difinis sian rilaton ĝis nun, kaj prezenti denove al

UN kaj EU precipe en kunteksto de senĉesaj integrigaj procesoj de Eŭropaj Nacioj.

Ĉiujare renovigi la proponon al UN kaj EU;

- c) Iniciati internaciajn decidajn agadojn propagande-inspirajn, por ke la punkto 4-a de Montevidea rezolucio de UNESKO el 1954-a jaro kaj same lernado de E-o en ĉiuj landoj estu finfine fare de la ŝtatoj realigata.

2. Aktivigi kaj vivi konstruan kaj noblan rivalan agadon de ĉiuj esperantistoj tiamaniere, ke ili konkorde kun ideaj premisoj de Zamenhof vere servu per ekzemplo de harmonia, amikeca kunlaboro. Tiel ke sento esti esperantisto devigu al noblaj, dignaj agoj. Precipe: - anstataŭ ĝisnunaj plej ofte nenion enportantaj enviemaj, kritikaj polemikoj, torpedantaj nur diversajn utilajn iniciatojn, konkrete proponadi proprajn, pli bonajn solvojn kaj konsekvence ilin realigi; - disvastigadi la ideon de la lingvo E-o precipe inter junularo, por konvinki ĝin al E-o kaj aktiva ties apogo; nuntempa junulara E-o movado estas malforta. Maljuna generacio formortas kaj aperas bezono de rejunigo de E-o movado;

- ambicio de ĉiuj esperantistoj devus esti penetro pere de informo pri E-o al ĉiuj eŭroparlamentanoj. Preskaŭ en ĉiu urbo troviĝas oficejoj de eŭroparlamentanoj, kiuj atendas interesiĝantojn. Se esperantistoj alvenos tien kaj sukcesos konvinki iun eŭroparlamentanon pri nia nobla ideo, do tio donos ŝancon por integriĝo de eŭropaj popoloj, - esperantistoj de Eŭropo kaj mondo estus devintaj fari ĉion eblan por ke tiu enskribo de E-o kiel portanto de E-kulturo sur la landan liston de nemateria heredaĵo de Pollando, ne restu nur sensignifa mortinta noto, sed ĉiuj sekvu ĝin per similaj enskriboj, precipe tiaj landoj kiel: Rusio, Israelo, Litovio, Hungario, Germanio kaj ankaŭ finfine UNESKO; - esperantistoj de ĉiuj eŭropaj landoj devus fari ĉion, por ke almenaŭ unu eŭroparlamentano el ĉiu lando povu partopreni en jubilea 100-a UK en Lilo. Tia partopreno fortigus aron da partizanoj de E-o en la EP kaj samtempe plirapidigus favoran decidon pri disvastigo de E-o en Eŭropo kaj la Mondo.

Se esperantistoj havas aŭtente sinceran volon por ke E-o iĝu mondkomunikilo, ili devus far siaj ekzemploj pravi al la mondo, ke tiu ĉi lingvo efektive estas la lingvo de amikeco, kiu plifaciligas ne nur interkomunikadon, sed ankaŭ vivon en harmonia konkordo. Ni ĉesu jam kvereli en niaj medioj, kaŭzi konfliktojn, interdividojn, nenion signifajn polemikojn kaj realigante ideajn premsiojn de L. Zamenhof, ni kune komencu konstrue agadi post 128-jara nesufiĉe ĝusta kaj prudenta agado.

Kazimierz Krzyżak kaj Edward Jaśkiewicz

Oficiala organo de Eŭropa Esperanto-Unio.

Finredaktita: la 28-an de februaro 2015

Redaktoro: Zlatko Tišljár

En la numero kunlaboris: Zlatko Tišljár, Halina Komar, Veronika Poor, Marjan Vochin, Szilvási László, Fabiano Henrique, Radojica Petrović, Kazimierz Krzyżak kaj Edward Jaśkiewicz

Kontakto: ztisljar@gmail.com

Retpaĝo: <http://www.europo.eu/eo/euhropa-bulteno>

